

## Taskoj el TeKu 117

Sur paĝoj 3/4 de TeKu 117 troviĝas peto esplori en via nacia lingvo nociojn koncerne trakforkojn kaj vojojn tra ili. Temas pri la RailLexic-nocioj 00181/01041 (simpla trakforko), 01035/01036 (devia kaj rekta vojoj) kaj pri la en RailLexic forgesitaj nocioj pri internenkurba kaj eksterenkurba trakforkoj. La desegnitaj simboloj bildigas la nociojn.

Sole Ludoviko Sekereŝ klarigis kelkajn nociojn en la serba kaj hungara faklingvoj. Por la sistemiga laboro ĉe Internacia Fervojunio UIC kaj por decidoj en Esperanto, neĉre necesas scii la solvojn en pli da landoj.

Ŝajnas ke pli facilas proponi Esperanto-terminojn, ol esplori en nacia lingvo. Tamen la peto retas: Bonvolu

- o lupreni fervojfakajn leksikonojn aŭ/kaj
  - o peti de konataj fakuloj koncernajn reglamentojn,
- por tie serĉi koncernajn terminojn kaj ties nacilingva difino.

## Vizito en fervoja laboratorio

En kadro de 55-a IFEF-kongreso estas planita vizito en mondscale unika Fervoja Laboratorio de Teknika Universitato Dresden. Ĝi okazos mardon, 13-an de majo, 16:30 – 18:00 h, post ekskurso D2 = rondveturo per tramo. Mi rekomendas ke ĉeestu tiuj gekolegoj, kiujn tre interesas trajntrafiko, sekuriga tekniko aŭ miniatura fervojo.

Ĉar la partopreno estas limigata je 25 personoj, mi petas esprimi vian koncernan deziron al mi – rete, skribe aŭ telefone (laŭ la kapo de TeKu). Tiukondiĉe vi ricevos apartan inviton de Faka Komisiono.

Bonan vojaĝon al Dresden kaj ĝojan kunlaboron deziras

*Heinz Hoffmann.*



# Terminara Kuriero

TeKu 119

Aprilo 2003

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: [esperanto@mail.dk](mailto:esperanto@mail.dk)

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: [IFEF.B90GR-mei@t-online.de](mailto:IFEF.B90GR-mei@t-online.de)

## Nekrologo

Fidela membro de Terminara Sekcio forlasis nin:

**Jaroslav "Sláva" David**

el Pustějov, Ĉeĥio, mortis 15-an de decembro 2002.

Jam ekde 1975 Sláva aktive kunlaboris en Terminara Komisiono / Sekcio, ĝis li pro apopleksio devis ĉesigi sian kunlaboron. Lia lasta terminologia kontribuo alvenis en decembro 2001. Severe kaj kapable li traktis la traduklaboron kaj trapensis profunde la tradukproponojn. Lia agado estis granda kontribuo al nia komuna celo. En la jaro 2002 li estiĝis Honora Membro de IFEF.

Por la revuo INTERNACIA FERVOJISTO Jaroslav David liveris multajn interesajn kaj valorajn klarigojn de erare uzitaj esprimoj por la rubriko "Pri lingva nivelo de IF" en 1997. El lia lasta letero en novembro 2002: "Mian esperon, eldoni la ĉeĥan aldonon al la Fervoja Terminaro, mi ne povis plenumi; mi ne trovis helpanton." Kaj laste: "Dum neniofarado mi sentas min malsana." Lia tuta vivo estis strebado por Esperanto.

En danka rememoro ni kliniĝas antaŭ tre bonkora, diligenta homo. Li ripozu en paco!


Nome de Faka Komisiono de IFEF kondolencas sincere liajn familianojn:

Jan Uldal Niemann

Heinz Dieter Hartig

E Henning Olsen

Heinz Hoffmann



## Rememorigo al kunsido en Budapeŝto (52-a kongreso en 2000)

Denove legante la artikolon sur paĝoj 4/5 de TeKu 111 (junio 2000), vi estas rememorigataj, ke tiam la partoprenintoj tre longe diskutis pri la plej trafa termino al grava nocio, kaj nur provizore decidis la terminon **vagonkombinaĵo**. Ili volis atendi la novan PIV kaj vidi, ĉu en ĝi troviĝas nova, aldona difino por seto, unio aŭ unuo, taŭga por anstataŭi la vorton kombinaĵo. Nun la demando estas respondebla per klara "ne". Seto estas nur propra nomo, unio kaj unuo restas neuzablaj por la koncerna nocio. Ludoviko Sekereŝ denove lanĉis la vorton **vagonligaĵo** por diskuto. Tiukoncerne jen ripeto de la difina komparo sur paĝo 2 de TeKu 109:

**kombinaĵo 1** = rezulto de plurelementa kunigo en difinita ordo; laŭcela aranĝo  
**ligaĵo 1** = tio, kiu estas fiksita, malliberigita per ŝnuro, ĉeno kaj simile, malhelpante moviĝon aŭ disiĝon


Sekve, la esprimo **kombinaĵo** akcentas difinitan ordon; la esprimo **ligaĵo** akcentas malhelpon je disiĝo. Per korespondado komence de 2000, 9 el 13 kolegoj preferis la terminon **vagonkombinaĵo**. Tiun rezulton konfirmis la ĉeestintoj en la budapeŝta kunsido.

Ankoraŭfoje necesas substreki, ke temas pri aktuale plej grava nocio koncerne fervojajn veturilojn por pasaĝertrafiko. Abundas fakaj artikoloj – ankaŭ de ni esperantistoj – pri konstruo, aĉeto kaj entrafikigo de pasaĝervagonkombinaĵoj, precipe kun envagonaj motoroj. Ĝenas la longeco de la termino **motorvagonkombinaĵo** plurfoje troviĝanta en unu teksto. Eblas mildigi tion, se oni enigis la tutan terminon nur unufoje ĉe komenco, kaj ripetfoje ĝeneraligas la nocion al "la vagonkombinaĵo" aŭ eĉ al "la kombinaĵo".

Pli kaj pli la pasaĝertrafiko okazas per motorvagonaroj anstataŭ per lokomotivtrakcio. Urĝe necesas, ke ni en la faklingvo klare esprimu nin, ĉi-koncerne ĝuste uzu la elementojn **-kombinaĵo**, **-kompleto**, **-aro**. Ni klare diferencigu inter teknikaj nocioj (RailLexic-fako MT) kaj trafikaj nocioj (RailLexic-fako PR).

Ĉi-koncerne **teknikaj nocioj** rilatas al veturilindustriaj produktoj aĉetataj fare de fervojaj entreprenoj. Tio povas esti lokomotivoj, solovagonoj (inkluzive de motorvagonoj) kaj – nuntempe plej grave – vagonkombinaĵoj (kun aŭ sen envagonaj motoroj). La kombinado de vagonoj en laŭtipe difinita nombro per firmligilo, jam apartenas al industria koncepto.

Bildo 1




Bildo 2




5

Bildo 3



Bildo 4



Ĉi-koncerne **trafikaj nocioj** rilatas al veturiluzo fare de fervojaj entreprenoj por plenumi transportotaskojn per trajnoj.

La termino trajnkompleto estis decidata ankaŭ en budapeŝta kunsido. Temas pri kompleto konsistanta el ĉiuj veturiloj por trafiki kiel trajno. Trajnkompleto do povas konsisti el

- lokomotivo(j) kun senmotora vagonaro,
- motorvagonaro,
- fervojserve sola(j) lokomotivo(j) aŭ veturebla(j) traklabormaŝino(j)

por veturi sur fervojlinio(j).

Vagonaro estas tutaĵo konsistanta el ĉiuj vagonoj de trajno. Ĝi povas konsisti el

- pluraj kunkuplitaj solovagonoj,
- pluraj kunkuplitaj vagonkombinaĵoj,
- unu solovagono,
- unu vagonkombinaĵo.

Motorvagonaro estas vagonaro trakciata per envagona(j) motoro(j). Ĝi povas konsisti el

- pluraj kunkuplitaj solo-motorvagonoj,
- solo-motorvagono(j) kun remorka(j) vagono(j),
- pluraj kunkuplitaj motorvagonkombinaĵoj,
- unu solo-motorvagono,
- unu motorvagonkombinaĵo.

Ankaŭ komparu la terminuzon kun la artikoloj Kurslinio S1 en antaŭurba trafiko de Dresden kaj Klintechniko inter Frankfurt (Main) kaj Dresden kun glosaro en TeKu 111.

### **Uzo de la vorto modulo**

Jan Werner proponis uzi la vorton modulo koncerne firme kombineblajn veturilojn aŭ partveturilojn. La nova PIV ebligas tiun uzon: En ĝi la nocio **modulo 6** kun sinonimo **sistembloko** sub **bloko 7** havas jenan difinon:

Relative memstara parto, kies aparta funkcio estas precize difinita, por ke oni povu projekti ĝin aparte kaj poste kunmeti en sistemon


La sekretario proponas krei la terminon **vagonmodulo** por elemento de artika vagono, kaj la terminon **modulvagono** por vagono de vagonkombinaĵo. Ne ĉiam estas simple konstati, ĉu temas pri unu artika vagono aŭ pri pluraj vagonoj. Tiukoncerne ni akceptu la decidon de konstruinto aŭ ekspluatanto, ĉu oni donis unu komunan vagonnumeron aŭ numeris la vagonkestojn apartaj. Cele ilustre klarigi la diferencon, troviĝas kvar bildoj sur paĝo 5.

- Bildo 1 montras motorveturilon "RegioSprinter", kies longo 24 m ne superas normalan longon de moderna pasaĝervagono, kaj pro tio ricevis 1 komunan vagonnumeron. Sekve ĝi estas artika motorvagono konsistanta el 3 artike interligitaj vagonmoduloj.
- Bildo 2 montras motorveturilon "Desiro", kies longo 41 m estas preskaŭ duvagona. Pro tio ambaŭ vagonkesto ricevis apartan vagonnumeron. Sekve ĝi estas motorvagonkombinaĵo konsistanta el 2 artike interligitaj modulvagonoj.

Ĉar ne nur temas pri motorvagonoj, du bildoj estas ripetitaj el TeKu 110:

- Bildo 3 montras duoblan aŭtotransportveturilon. Spite al kompleta rulekipaĵo ĉe ĉiu ĉasio, la tutaĵo ricevis 1 komunan vagonnumeron. Sekve ĝi estas artika vagono konsistanta el 2 artike interligitaj vagonmoduloj.
- Bildo 4 montras duonon de kvarobla pasaĝerveturilo. Ĉar ĉiu vagonkesto ricevis apartan vagonnumeron, tio estas vagonkombinaĵo konsistanta el 4 artike interligitaj modulvagonoj.

Oni povas konsistigi jenan nociosistemon en la subfako MT40 (veturiloj):



- solovagono** = vagono kun ambaŭflanke trafikaj (per manovristo manipuleblaj) kupliloj (ŝraŭbokuplilo aŭ centra bufrokuplilo)
- kapvagono** = modulvagono kun unuflanke trafika kuplilo, aliaflanke firmligilo (nur en metiejo manipulebla firmkuplilo aŭ artikulo inter la vagonkesto)
- intervagono** = modulvagono kun ambaŭflanke firmligiloj

La nocio **vagonmodulo** apartenas al la subfako MT60 (veturilelementoj).